

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 07/11/2019 Kvarcentkvindkunua eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **800,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **276,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **231,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

## Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”. N.ro.93



En siaj paragrafoj 90 kaj 91 da ses paĝoj P.A.G. klarigas la uzon de la adverboj ĉi, for, jam, ĵus, nun, plu, tuj, ajn, ĉu, do, eĉ, ja, jen, jes, mem, ne, tre, ju, des, nur, pli, plej, tro. Jen ekzemploj:

Li donis konsilon, protekton, eĉ monon. Ĉi tiu ĉambro estas eĉ pli granda. Mi sentas min nun eĉ pli malbone. Eĉ kun via helpo mi ne sukcesis. Eĉ oni povas lin nomi simpla idioto. Ĉu? Eĉ! (=jes, mi venos). La pilko estis kaj restis for. Li biciklis for el la urbo. For la manoj! For la neŭtralismoj! Multaj el niaj pioniroj jam ne vivas. Tiuj estas jam precizaj difinoj. Jen tio kion mi proponas. Jen mia mondonaco! Li ĵus foriris. Ŝi estis kvankam konvinkita. Kvankam pluvas, mi tamen eliris. Nun la reĝo mem volis ĝin vidi. Mi ja mem venis al la sama konkludo. Ne pelu tiun, kiu mem forkuras. Nur du

homoj venis. Ili nur babilis. (Notu ke “nur” staras ĉiam antaŭ la vorto indikanta la elektiton: Nur li helpis ŝin + Li nur mallonge helpis + Li helpis nur ŝin). El siaj filoj li plej amas Petron. Li venis kiel eble plej frue. Li malplej helpis. Vi pli helpus, se vi povus. Li ne venos plu. Do ŝi tuj venis.

(daŭrigota)

**Marcel Leereveld.**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

## La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 2a de novembro estis la unua sabato. Venis



Roger, John, Michael, Chris kaj Ian.

**Roger Springer**



**(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)**

## Konfeso en mia ĝardeno.



**MI KONFESAS KE MI ESTIS MALPRAVA PRI "TIALO" .**

Mi humile petas pardonon al la kelkaj samideanoj kiuj jam uzas la vorton "tialo" por "motivo". Ili devos ree ŝanĝi, kiel devos preskaŭ ĉiuj Esperantistoj. Jam antaŭ pli ol dudek jaroj mi eltrovis, ke ne eblas ke "kialo" signifigu "motivon" aŭ "kaŭzon", kaj mi plu scias tion. Sed ĉe tiu eltrovo mi estis tro senzorgema kaj simple diris al mi "Oh, sekve "kaŭzo kaj motivo" devas esti "tialo" Mi malpravis, ĉar "tialo" estas preskaŭ same malĝusta kiel "kialo". (Mi kredis en "tialo", ĉar ĝi posedas en la respondo la motivon).

Antaŭ kelkaj noktoj mi eltrovis tion, kaj mi eltrovis tion tre malfrue post dudek jaroj. Mi eltrovis tion pro tri ĵusaj okazoj al mi:

- 1e. ke Donald Rogers devigis min pli zorge kaj pli profunde studi la problemon de "kialo" kaj "tialo". Mi dankas lin pro tio.
- 2e. La proverbo de Zamenhof "Ĉiu "tial" havas sian "kial". Mi dankas lin pro tio.
- 3e. Mia eltrovo (eble aliaj eltrovis tion antaŭ mi), ke la nesimplaj korelativoj (ekz. kiam, tiam, ĉiam kaj neniam), kvankam estante apartaj radikoj, tamen havas radikon kun du signiferoj por la du partoj, kiuj du elementoj havas ne-aglutinan vicordon. Mi bezonis la malfruan nokton por eltrovi tion. Mi dankas min pro tio.

**N.ro 1)** plu daŭras, **n.ro 2)** klare montris, ke "kialo" signifas demandon, ne kaŭzon aŭ motivon, kaj ke "tialo" ne signifas kaŭzon aŭ motivon sed "respondon". Kaj **n.ro 3)** klarigas la Zamenhof'an koncepton. N.roj 1) kaj 2) ne bezonas pli da klarigo, sed n.ro 3) verŝajne bezonas.

Ni prenu kiel ekzemplojn la vortojn "kial" kaj "tial". En ambaŭ la du signiferoj estas "k-" aŭ "t-" kaj "ial", kaj tiuj "k-" kaj "t-" estas la ĉefelementoj, do kontraŭ-aglutine pro pli da klareco. La flankelemento estas "-ial" kaj havas kompreneble la prepozitivan signifon "pri kaŭzo/motivo". Do "k-ial" estas "demande (k-) pri motivo(ial)" kaj "t-ial" estas "respondo (t-) pri motivo (-ial)". Kaj "demande" kaj "responde" ŝanĝiĝas per "o" por fari substantivojn, NE de "pri la motivo" sed de la demando aŭ la respondo. En angla aglutina maniero oni povus diri *"the why-question and the therefore-answer"*, do demando kaj respondo pri io (ĉikaze pri motivo, sed ĉe ekz. "kiamo/tiamo" pri tempo). En la germana: *"die Warumfrage und die Darumantwort"*. Kaj ankaŭ jam ĉe Zamenhof: "La tial-respondo kaj ĝia kial-demando": "La tialo kaj ĝia kialo", ambaŭ "pri la motivo, NE la motivo mem. Kaj do estas la parto "ial" nur kiu donas la signifon de la motivo, kaj tiun ni povas substantivigi al

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

“ialo”. SEKVE NUR “IALO” POVAS SIGNIFI “KAŬZON /MOTIVON MEM” kaj “kialo./tialo” nenion pli ol “demando pri la ialo” kaj “respondo pri la ialo”. Kvankam la kialo kaj la tialo enhavas la motivon, ili ne estas la motivo mem sed nur la demando aŭ la respondo. Cetere oni ne bezonas ofte uzi “ialo”: precipe nur se oni volas kombini “kaŭzon” kaj “motivon” kaj “rezonadon”. Por “kaŭzo” mi preferas uzi la prepozitivojn “pro kio” kaj “pro tio”, kiun distingon faras la nederlanda kaj la germana (*waarom* = “kial” kaj *waardoor* = “pro kio”; germane “*darum*” kaj “*dadurch*”). (Notu ke la prepozitivo “pri la motivo” egalas gramatike al adverbo “ial” kiu kiel substantivo fariĝas “ialo”, motivo).

Marcel Leereveld.

P.s. Interkrampe:

Ĉar la vorto “ialo” sonas tre malforte por forta ideo de motivo, la kelkaj ĝisnunaj uzantoj de “tialo” kapablos, pro stilo, plu uzi “tialo”, pli emfaza, (tamen NE “kialo!) sed tiukaze ili devos konscii ke tiu “tialo” signifas “Kaŭzo/motivo en respondo”. M.L.

## RESPONDO AL PETER WEIDE .

Oni, kaj mi, fiksas la komencon de la plenkreskuleco tute arbitre, **unue** ĉar oni ne scias la ĝustan jaron, **due** ĉar ĝi estas malsama por ĉiu el la homoj, kaj **trie** ĉar, kiel Peter mencias, la plenkreskado de la cerbo komenciĝas je la 25-a jaro. Kaj oni povus eĉ aserti, ke aliaj funkcioj de la korpo plu kreskas post 25. Sed leĝe estas utila kaj eĉ necesa, samopinii pri unu dato. Mi elektis 20-jaraĝa, arbitre, kaj aliaj personoj aŭ landoj aŭ periodoj elektis 18 aŭ 21. Simila problemeto estas decidi kiam finiĝas la infaneteco. Plej ofte oni decidas, ke je la fino de la tria aĝjaro. Marcel.

## KELKAJ HISTORIAJ FAKTOJ.

La plano estis, organizi en la jaro 1869 grandskalan internacian ceremonion por malfermi la novan Suezkanalon en Egipto. Antaŭe ĉiuj ŝipoj irantaj al Hindujo, orienta Azio, kaj Aŭstralio devis veturi la longan vojon ĉirkaŭ la Bonesperkabo en suda Afriko. Por tiu ceremonio, kaj samtempe por ceremonii la novan Operdomon en Kairo, Egipto, oni invitis la plej grandan operkomponiston, Giuseppe VERDI, komponi operon bazitan sur okazaĵo en la historio de Egipto. Unue Verdi rifuzis, sed post kelkjara premado de siaj geamikoj, li fine akceptis la komision. Sed intertempe oni en 1869 jam malfermis la kanalon kaj la operejon, kaj uzis por tiuj ceremonioj la Verdi’ an operon Rigoletto.

Oni do decidis okazigi duan ceremonion, en Januaro 1871, sed povis okazigi ĝin nur en Decembro 1871, pro la Franc-germana Milito tiama. Unu jaron poste la opero montratis en Milano, Italujo, kaj ĝi estis tiom triumfa, ke ĉe la fino Verdi devis reveni al la scenejo tridekdu fojojn sub grandega aplaŭdo. Cetere ĉe lia funebro ĉeestis pli da italaj kaj internaciaj funebrantoj ol iam funebris por reĝo aŭ alia ŝtatestro.

La opero Aida estas unu el la lastaj operoj komponitaj de li, post tridekkvino da aliaj, el kiuj deko da ili ludatas centojn da fojoj ĉiujare en la mondo, kaj bonŝance ankaŭ en Aŭstralio. Marcel,  
(nomita tia laŭ la baritonrolo Marcello en la opero La Bohe’me de Puccini).

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

**REAGE AL SENBAZA MORALECA KRITIKO**

per jam antaŭe menciitaj samaj asertoj, ne al novaj klarigoj miaj. Nun mi reagis nur per kelkaj ĝeneralaj rimarkoj, por ne tedi la legantojn.

Estas strange: dum en la komenco de nia ekzamenado pri kialo/tialo, Donald argumentis normale, honeste, sed dum la lastaj kelkaj semajnoj li ŝanĝis siajn honestajn kaj komprenemajn kritikojn kaj defendojn al nekutimaj insidoj, falsigoj kaj neveraĵoj. Kial tiuj ŝanĝoj? Li nun koncentriĝas sur senutilaj mencioj pri miaj eraroj en la kompreno kaj uzo de “kial” kaj “tial”, kiujn adverbojn mi komprenas kaj uzas ekzakte same kiel li kaj ĉiuj aliaj. Kia perdo de tempo, peni prui ke mi eraras en la uzo de tiuj adverboj kaj induki neveraĵojn. Kaj kie mi bezonas liajn pruvojn ke mi malpravas, nome pri la signifoj de “kialo” kaj “tialo”, li silentas, aŭ simple diras ke mi malpravas aŭ ne komprenas la aferon. En la komenco li faris tion, kvankam li precipe kopiis la opiniojn de la vortaroj, kiujn opiniojn mi ne akceptis kaj kritikis per pruvoj. Nun li ne plu donas pruvojn, sed simple diras ke mi malpravas aŭ ne komprenas, kaj ripetas siajn de mi kun pruvoj atakitajn kritikojn. Speciale lia lasta artikolo, en n.ro 450, plenas de sensencaĵoj pri “kial” kaj “tial”, kaj nur asertoj sen pruvoj pri miaj klarigoj pri la signifoj de “kialo” kaj “tialo”. Tiu nuna argumentado estas senvalora, kaj ofte nehonesta. Mi ne diras ke li estas malhonesta, eĉ ne nehonesta, sed la ŝanĝoj de miaj kritikoj kaj klarigoj efikas tiel. Mi eĉ ne pensas, ke li ŝanĝis sian taktikon intence, ĉar ĝi estas tre videbla de ĉiuj. Mi demandas min, ĉu Donald ne vere komprenas ke li intermiksas la vortojn Demando kun Kaŭzo/Motivo kaj la vortojn Rezulto kun Kaŭzo/Motivo kaj kun la Ago kies Kaŭzon/Motivon oni volas scii. Jen ekzemplo de lia miksado (kiun li certe ne enkondukis intence, sed alia persono povus tion fari por mistifiki). En lia ekzemplo, en kiu li volas montri ke la kialo estas la kaŭzo, mi ŝanĝis la vortojn “mi” kaj “li” al “Petro” kaj “Johano” por ne miksi min (Marcel) kaj lin (Donald) en la de Donald donitan ekzemplon.

Lia ekzemplo estas: “Petro diris al Johano, kial la gazono estis humida (fakto jam konata de Petro): ĝi estis humida, ĉar la pluvo falis dum la nokto (jam konata fakto)”.

Sed ne temas ĉu la kaŭzo (de la humideco) estas konata de Petro, kiu agas nur post la demando ate de Johano, sed ĉu ĝi estas konata de Johano, kiam tiu demandas, per “kial”, por scii la kaŭzon nekonatan de li (Johano). Kaj la fakto estas ke dum sia uzo de “kial” Johano ne konas la kaŭzon. En la ekzemplo Donald diras nur ke Petro konas la kaŭzon, kiu Petro kompreneble jam konas la faktojn, ĉar ne li demandas per “kial”, sed Johano. La ekzemplo de Donald estas kvazaŭ iu kiu jam konas la kaŭzon demandus al alia kiu ankoraŭ ne konas la kaŭzon.

Lia ekzemplo devus teksti “Li demandis al mi la kaŭzon (ne konatan de li) ke la gazono estis humida, kaj mi respondis per “tial, ĉar la pluvo falis dum la nokto (kompreneble konata de mi sed ne de li, alie li ne demandus al mi)”. Do mi pravis dirante “Do ‘kial’ estas demando kaj ne indikas, ke la respondo jam estas konata”. Kaj la komenco de la ekzemplo de Donald povus ankaŭ teksti “Mi diris al li la kaŭzon (aŭ “tial”), pro kiu kaŭzo (aŭ “tialo”) la gazono estis humida”. Cetere ni lasu Zamenhof decidi per sia ‘Ĉiu “tial” havas sian “kial”’, (= ĉiu respondo havas sian demandon, aŭ ĉiu tialo havas sian kialon).

Jen ekzemplo de miaj instruoj:

**La Ago:** Li ne venis al la kunveno.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Mi demandas "Kial li ne venis al la kunveno?".

Mia demando "Kial li ne venis al la kunveno".

Mia "kial li ne venis al la kunveno".

"Mia kialo pri kial li ne venis al la kunveno".

Mi ricevas la Respondon pri "kial li ne venis al la kunveno".

La respondo estas "Tial li ne venis al la kunveno".

La respondo estas la tialo de lia neveno.

( La rezulto de la tialo estas ke li ne venis al la kunveno. )

(La rezulto de ke li estis malsana estas ke li ne venis. )

La kialo (= demando) pri lia neveno rezultis en la tialon (= respondo) pri lia neveno.

**Marcel Leereveld.**



## Karaj kontribuantoj. Sen vi, AE ne povas ekzisti

*Merkredvespere mi sendas la novaĵleteron al la provlegantino por kontroli la lingvon kaj elsendas al la legantoj dum ĵaŭdo. Uzu ĝin por la reklamo de viaj semajnfinaj eventoj. Poste informu pri la sukcesoj de viaj kunvenoj en la sekvanta "Aŭstraliaj Esperantistoj" por montri ke viaj kluboj ekzistas kaj aktivas.*



## Emeritaj konkursĉevaloj mortigataj por fari manĝaĵon por la katoj, hundoj ktp



Kontraŭuloj de la mortigmetodoj de emeritaj konkursĉevaloj estas multegaj.

La buĉejoj por ĉevaloj nun estas multe kritikataj pro siaj mortmetodoj kaj antaŭaj agoj kontraŭ la ĉevaloj, sed nur pro la mortigo de emeritaj konkursĉevaloj.

Ĉu klasbatalo? Ĉu la aliaj ordinaraj ĉevaloj ne gravas? Ĉu la aliaj ĉevaloj ne egale suferis? Homoj ankaŭ havas klasojn kiuj

pravigas terurajn agojn kontraŭ aliaj klasoj.

Mi hontas por la Homaro. **Roger Springer**



## 3zzz

En la elsendo de la 4a de novembro estas esperplena informo pri la prioritato rearbarigi Brazilon kaj plia mesaĝo pri la ĵus forpasinta nepo de Zamenhof.

**Franciska Toubale**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**